

Katolika Esperanto-Movado

IKUE - Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista

Karismo

- per Esperanto plenumi la ordonon de Jesuo Kristo:
“*Iru en la tutan mondon kaj prediku la evangelion al ĉiu kreitaĵo*”
- montri la unuecon de la Eklezio uzante la internacian lingvon
- kontribui al realigo de la homaj interkompreno, frateco kaj paco
- strebi por “*ke ĉiuj estu unu*”

Agado

Paŝtista agado kaj preĝado

IKUE proponas sanktajn mesojn en lingvo Esperanto dum la Eo-renkontoj (UK, konferencoj de fakaj asocioj, renkontiĝoj). Ĝi organizas ĉiujare sian propran internacian kongreson unusemajnan. Lokaj grupoj kaj asocioj de katolikaj esperantistoj ankaŭ proponas renkontiĝojn (biblia semajnfino, junulara Eo-tendaro...) kun Liturgio de l’Horoj, rozario, prelegoj, pilgrimoj ktp.

Ekumenismo kaj interreligia dialogo

La diverseco de la esperanto-mondo kaj la frateco en ĝia sino faciligas interreligiajn renkontojn. Ekde 1968, la protestanta asocio kaj la katolika asocio organizas sian internacian kongreson kune ĉiun duan jaron. La plej grava kant- kaj preĝlibro en Esperanto, Adoru, estis redaktita kunlabore kun kristanoj el la tuta mondo.

Bonfarado

IKUE subtenas diversajn misiojn (orfaj adoptoj, preĝejo, puto, lernejo, orfejo, pontoj, kaprinoj, komputero, edifaj libroj ktp.) en diversaj landoj de Afriko (Benino, Burundio, Kongo, Ruandio, Togolando) kaj Madagaskaro.

Eldonado kaj informado

Pastroj kaj laikoj regule prilaboras eldonojn de la Biblio en Esperanto kaj de diversaj aliaj eldonaĵoj: meslibroj, enciklikoj, kant- kaj preĝlibroj... La revuo de IKUE, Espero Katolika (4 numeroj jare), kaj la Eo-programoj de Radio Vatikana dissendas la instruon de la Eklezio kaj servas kiel informkanalo inter la katolikaj esperantistoj.

Katolika Esperanto-Movado

IKUE - Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista

Karismo

- per Esperanto plenumi la ordonon de Jesuo Kristo:
“*Iru en la tutan mondon kaj prediku la evangelion al ĉiu kreitaĵo*”
- montri la unuecon de la Eklezio uzante la internacian lingvon
- kontribui al realigo de la homaj interkompreno, frateco kaj paco
- strebi por “*ke ĉiuj estu unu*”

Agado

Paŝtista agado kaj preĝado

IKUE proponas sanktajn mesojn en lingvo Esperanto dum la Eo-renkontoj (UK, konferencoj de fakaj asocioj, renkontiĝoj). Ĝi organizas ĉiujare sian propran internacian kongreson unusemajnan. Lokaj grupoj kaj asocioj de katolikaj esperantistoj ankaŭ proponas renkontiĝojn (biblia semajnfino, junulara Eo-tendaro...) kun Liturgio de l’Horoj, rozario, prelegoj, pilgrimoj ktp.

Ekumenismo kaj interreligia dialogo

La diverseco de la esperanto-mondo kaj la frateco en ĝia sino faciligas interreligiajn renkontojn. Ekde 1968, la protestanta asocio kaj la katolika asocio organizas sian internacian kongreson kune ĉiun duan jaron. La plej grava kant- kaj preĝlibro en Esperanto, Adoru, estis redaktita kunlabore kun kristanoj el la tuta mondo.

Bonfarado

IKUE subtenas diversajn misiojn (orfaj adoptoj, preĝejo, puto, lernejo, orfejo, pontoj, kaprinoj, komputero, edifaj libroj ktp.) en diversaj landoj de Afriko (Benino, Burundio, Kongo, Ruandio, Togolando) kaj Madagaskaro.


Eldonado kaj informado

Pastroj kaj laikoj regule prilaboras eldonojn de la Biblio en Esperanto kaj de diversaj aliaj eldonaĵoj: meslibroj, enciklikoj, kant- kaj preĝlibroj... La revuo de IKUE, Espero Katolika (4 numeroj jare), kaj la Eo-programoj de Radio Vatikana dissendas la instruon de la Eklezio kaj servas kiel informkanalo inter la katolikaj esperantistoj.

Sanktaj patronoj

Nia Sinjorino de l'Espero

sankta Pio la 10a
sankta Maksimiliano Kolbe
beata Titus Brandsma



Kelkaj datoj

- 1902 unua asocio de katolikaj esperantistoj, en Tours, Francio
- 1903 unua numero de revuo *Espero Katolika*
- 1910 unua internacia kongreso de katolikaj esperantistoj, fondo de IKUE
- 1912 unua eldono de la Nova Testamento en E-o
- 1926 unua eldono de la Biblio (sen la duakanonaj)
- 1950 22a kongreso de IKUE, en Romo, post 11-jara interrompo
- 1977 unuaj elsendoj en E-o de Radio Vatikana
- 1990 dekretoj de la Kongregacio por la Dia kulto kaj disciplino de la Sakramentoj pri la normoj de mescelebrado kaj la dimanĉa meslibro en Esperanto
- 1992 jura agnosko de IKUE (dekreto de la Pontifika Konsilio por Laikoj)
- 1994 unua Papa bondeziro urbi et orbi en Esperanto
- 2001 *Adoru*, 1400 paĝoj de kristanaj kantoj el la tuta mondo
- 2002 eldono de la duakanonaj libroj

Centra oficejo

IKUE - Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista ikue@ikue.org
Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, tel./faks. +39-06.39.63.81.29

Kelkaj TTTejoj

<http://www.ikue.org/> - oficiala hejmpaĝo de IKUE
<http://www.ikue.org/landaj.html> - Landaj reprezentantoj de IKUE
<http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/index.asp> - Radio Vatikana
<http://www.esperokatolika.org/> - arkivo de la revuo *Espero Katolika*
<http://www.geocities.com/cigneto/> - kristanaj kantoj el la tuta mondo
<http://www.murialdo.it/didaskaleion/esper/fund00.htm> - kurso pri Kristanismo


Radio Vatikana elsendas tri programojn en Eo ĉiusemajne:

- dimanĉe kaj solenoj: religia penso, informoj
 - merkrede: la paŝtista instruo de la Papo dum la merkreda ĝenerala aŭdienco
 - ĵaŭde: "Nuntempaj religiaj temoj kaj problemoj: kristana vidpunkto"
- De 21h20 ĝis 21h30 (MET), per kurtondoj aŭ interrete (vidu ĉisupre).

Sanktaj patronoj

Nia Sinjorino de l'Espero

sankta Pio la 10a
sankta Maksimiliano Kolbe
beata Titus Brandsma



Kelkaj datoj

- 1902 unua asocio de katolikaj esperantistoj, en Tours, Francio
- 1903 unua numero de revuo *Espero Katolika*
- 1910 unua internacia kongreso de katolikaj esperantistoj, fondo de IKUE
- 1912 unua eldono de la Nova Testamento en E-o
- 1926 unua eldono de la Biblio (sen la duakanonaj)
- 1950 22a kongreso de IKUE, en Romo, post 11-jara interrompo
- 1977 unuaj elsendoj en E-o de Radio Vatikana
- 1990 dekretoj de la Kongregacio por la Dia kulto kaj disciplino de la Sakramentoj pri la normoj de mescelebrado kaj la meslibro en Esperanto
- 1992 jura agnosko de IKUE (dekreto de la Pontifika Konsilio por Laikoj)
- 1994 unua Papa bondeziro urbi et orbi en Esperanto
- 2001 *Adoru*, 1400 paĝoj de kristanaj kantoj el la tuta mondo
- 2002 eldono de la duakanonaj libroj

Centra oficejo

IKUE - Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista ikue@ikue.org
Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, tel./faks. +39-06.39.63.81.29

Kelkaj TTTejoj

<http://www.ikue.org/> - oficiala hejmpaĝo de IKUE
<http://www.ikue.org/landaj.html> - Landaj reprezentantoj de IKUE
<http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/index.asp> - Radio Vatikana
<http://www.esperokatolika.org/> - arkivo de la revuo *Espero Katolika*
<http://www.geocities.com/cigneto/> - kristanaj kantoj el la tuta mondo
<http://www.murialdo.it/didaskaleion/esper/fund00.htm> - kurso pri Kristanismo

Radio Vatikana elsendas tri programojn en Eo ĉiusemajne:

- dimanĉe kaj solenoj: religia penso, informoj
 - merkrede: la paŝtista instruo de la Papo dum la merkreda ĝenerala aŭdienco
 - ĵaŭde: "Nuntempaj religiaj temoj kaj problemoj: kristana vidpunkto"
- De 21h20 ĝis 21h30 (MET), per kurtondoj aŭ interrete (vidu ĉisupre).